REKOMENDOJ de la 62a AMO-seminario en Aŭklando, Nov-Zelando

La seminario okazis en la 17a kaj 18a de januaro 2020, oni plenumis FLAM-analizon, kies rezultoj estas spegulaj en la sekvaj rekomendoj:

- Okazigi lingvajn festivalojn; altiri lingvemulojn kaj atesti la ekziston de esperantistoj.
- Kuniĝi kun similideanoj: aktivuloj kaj asocioj kun celoj parencaj al Esperantismo.
- Vidigi sian esperantistecon en netrudaj manieroj.
- Ekspluati la akceptemon de progresemaj lernejoj, kiuj aprezas alternativajn projektojn.
- Krei laborbazarojn, retlokojn, kie eblas parigi projektojn kaj ideojn kun homoj kun laborfortoj.
- Proponi servojn al nemovadaj fakaj asocioj – nia varo: justaj internaciaj kontaktoj.
- Pli aktive engaĝiĝi ĉe ekologiaj movadoj kaj tiuj pri daŭripovaj vivstiloj.

Apenaŭ imageblas lando, kie la ekologia argumento trovos pli pozitivan reagon.

- Evoluigi allogaĵojn, kiuj plaĉos al pli junaj personoj.
- Konigu kaj utiligu filmojn en *Youtube* (iuj havas subtitolojn), <facila.org> kaj similaĵoj.
- Kreu ilojn por konvinki universitatojn starigi kursojn (La eduka valoro de Esperanto)
- Kiel havigi al la Eo-klubo en la Universitato de Aŭklando instruistojn aŭ instruantojn.
- Pli aktive konigi la maorian kulturon tra la mondo – unue per Vikipedio.
- Eluzi la esperantistajn tagojn, ankaŭ la Tagojn, Jarojn, Jardekojn de UN kaj Unesko.